der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

12. Jahrgang / Nr. 77 (3/1976) 30 Pf

Programo de plua batalo por paco kaj internacia kunlaborado, por libero kaj sendependo de popoloj

(El la raporto de CK de KPSU al la XXV Kongreso de KPSU, legita de la Ĝenerala Sekretario de CK de KPSU Leonid BREĴNEV la 24-an de februaro 1976).

Taksante la internacian pozicion de nia lando kaj la situacion en la monda areno, la Centra Komitato de la Partio konkludas, ke la plua batalo por la intereso de paco, libero kaj sendependo de popoloj postulas nun solvon unuavice de la sekvaj maturiĝintaj taskoj:

— Konstante fortigante unuecon de la frataj solialismaj ŝtatoj kaj evoluigante ilian ĉiuflankan kunlaboradon en konstruado de nova socio, kreskigi ilian aktivan komunan kontribuon en la firmigo de paco;

— Strebi ĉesigon de la kreskanta, danĝera por la mondo vetarmiĝado kaj transiron al reduktado de la akumulitaj provizoj de armilaro, al malarmigo. Tiucele:

a) fari ĉion eblan por finpreparo de nova kontrakto inter USSR kaj USONO pri limigo kaj reduktigo de strategiaj armiloj, por subskribo die internaciaj interkonsentoj pri ĝenerala kaj plena ĉesigo de elprovoj de nuklea armilaro, pri malpermeso kaj neniigo de armilaro kemia, pri malpermeso krei novajn genrojn kaj sistemojn de armiloj por amasa ekstermado, kaj ankaŭ influi la naturan medion en militaj kaj aliaj malpacaj celoj;

b) entrepreni novajn strecojn por aktivigo de intertraktadoj pri reduktigo de armitaj fortoj kaj armilaroj en Centra Eŭropo. Post efektivigo de interkonsento pri la unuaj paŝoj tiudirekte, daŭrigi en la sekvontaj jaroj la kaŭzon de la milita malstreĉigo en la nomita regiono;

c) strebi, ke anstataŭ la nuna konstanta kresko de la militelspezoj en multaj ŝtatoj venu la praktiko de ilia regula reduktigo;

d) entrepreni ĉiujn rimedojn por plej baldaŭa kunvoko de Tutmonda konferenco pri malarmado.

— Koncentrigi strecĉojn de la pacamaj ŝtatoj por likvido de la restantaj militdanĝeraj regionoj kaj antaŭ ĉio por efektivigo de justa kaj firma reguligo en Meza Oriento. Lige kun tia reguligo koncernaj landoj traktu la problemon pri kontribuo al ĉesigo de vetarmado en Meza Oriento.

— Fari ĉion por profundigi malintensigon de internacia strecĉo, ties aliigo en konkretajn formojn de reciproke profita kunlaborado inter ŝtatoj. Aktive agi por plene efektivigadi la Finan akton de la Tuteŭropa konsiliĝo, disvolvadi pacan kunlaboradon en Eŭropo. Konforme al la principoj de paca kunekzistado konsekvence daŭrigi evoluigon de interrilatoj de longtempa reciproke profita kunlaborado en diversaj sferoj — politiko, ekonomio, scienco kaj kulturo — kun Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko, Francio, FRG, Grandbritio, Italio, Kanado, ankaŭ Japanio kaj aliaj kapitalismaj ŝtatoj.

— Konduki la aferon al garantiigo de sekureco en Azio surbaze de komunaj strecĉoj de la ŝtatoj de tiu kontinento.

— Strebi al subskribo de tutmonda kontrakto pri neuzo de forto en internaciaj rilatoj.

— Konsideri unu el plej gravaj internaciaj taskoj plenan likvidon de ĉiuj restaĵoj de la sistemo de kolonia subpremado, rompo de egalrajteco kaj sendependo de popoloj, likvidon de ĉiuj nestoj de koloniismo kaj rasismo.

— Celi neniigon de diskriminado kaj ajnaj artefaritaj baroj en internacia komerco, likvidon de ĉiuj fenomenoj de malegalrajteco, diktado, ekspluato en internaciaj ekonomiaj rilatoj.

Tiuj estas, laŭ nia kredo, la ĉefaj taskoj, kies solvon postulas en la nunaj kondiĉoj la interesoj de paco kaj sekureco de popoloj, progreso de la homaro. Ni konsideras ĉi-proponojn kiel organikan daŭrigon kaj disvolvon de la Pacprogramo, aprobita de la XXIV-a partia kongreso, kiel **programon de plua batalo por paco kaj internacia kunlaborado, por libero kaj sendependo de popoloj.** Ni direktos al solvo de tiuj taskoj la eksteran politikon de nia lando kaj kunlaborados en tio kun aliaj pacamaj ŝtatoj.

Permesu esprimi la certecon, ke la noblaj celoj de nia politiko en la internacia areno renkontos larĝan komprenon kaj subtenon flanke de ĉiuj pacamaj, progresemaj fortoj, de ĉiuj honestaj homoj sur la Tero.

(Trad. sovetiaj esperantistoj)

Fino al la vetarmado!
Alvoko - Stockholm 1975

La venkoj, atingitaj en la sfero de paco kaj malstreĉiĝo, venigis novan internacian klimaton, novajn esperojn, novajn fidon kaj optimismon inter la popoloj.

La paco **povas** esti defendata. Mondo de paco **povas** esti konstruata.

La unueco de la pacfortoj kapablas venki la obstaklojn, kiuj ankoraŭ baras la vojon en novan mondon, el kiu por ĉiam estas forigataj agreso, ekspluatado kaj subpremado, malsato kaj malriĉeco.

La vetarmado estas la decida obstaklo, kiu malhelpas la klopodojn por fari la malstreĉiĝon nereturnebla.

La vetarmado ankoraŭ ĉiam minacas nian planedon per nuklea detruo. Kaŭze de la malstreĉiĝo tiu ĉi danĝero iom post iom estas repuŝata, sed la vetarmado endanĝerigas la daŭradon de la malstreĉiĝo.

En multaj landoj de la mondo, kiuj ĉiam troviĝas vidalvide kun plialtiĝantaj vivtenaj kostoj, inflacio kaj ekonomiaj krizoj, la vetarmado ege pezas sur la vastaj popolamasoj. Ĝi forrabas de la popoloj grandan parton de iliaj riĉaĵoj kaj rimedfontoj.

La malstreĉiĝo ebligis novajn venkojn en la batalo pri nova internacia ekonomia ordo kaj pri la rajtoj de la popoloj disponi pri la riĉaĵoj de sia propra grundo. Ĝi estas armilo en la batalo pri finigo de la disrabado per la monopoloj kaj multnaciaj kompanioj.

La vetarmado kaj la amasigado de armiloj en la manoj de la imperiistoj kuraĝigas kaj fervorigas la agresemajn, militarismajn, koloniismajn, rasismajn fortojn. La malstreĉiĝo estas grava faktoro por plifortigi la klopodojn pri nacia sendependeco, justeco kaj socia progreso en ĉiuj landoj.

La malstreĉiĝo kreas novajn eblecojn por solvi la hodiaŭ plej akutajn problemojn kaj por forigi la fokusojn de streĉiteco kaj konfliktoj. La ĉesigo de la vetarmado ebenigus la vojon al la granda celo de la homaro: malpermeso de ĉiuj nukleaj kaj aliaj amasneniigaj bataliloj, ĝenerala kaj plena senarmiĝo — mondo sen armiloj.

La monda publiko havas pli grandan respondecon kaj pli grandan potencon ol iam ajn antaŭe. Ĝi estas kapabla repuŝi pli kaj pli la militprofitulojn, la adeptojn de la malvarma milito, la malamikojn de la homaro. La Monda Packonsilantaro alvokas ĉiujn registarojn kaj parlamentojn, ĉiujn pac- kaj aliajn movadojn, politikajn partiojn, sindikatojn, virinajn kaj junularajn organizaĵojn, religiajn, sociajn kaj kulturajn rondojn, kiuj penas pri progreso de la homaro, doni al si reciproke la manon por nova, granda, mondvasta ofensivo kontraŭ la vetarmado.

Fino al la vetarmado — por ke la malstreĉiĝo fariĝu nereturnebla!

Fino al la vetarmado — por ke nova internacia ekonomia ordo efektiviĝu!

Pri Esperanto en la sindikata konferenco

En Praha okazis inter la 27a kaj 30a de oktobro 1975 la VII-a konferenco de Internacia sindikata unuiĝo de laboruloj en konstru- kaj lignoindustrio (UITBB), ano de Tutmonda Sindikata Federacio (TSF), kun 250 delegitoj el 55 landoj.

Membro de la franca delegitaro Petro Levi, reprezentanta la sindikatan unuiĝon de cement-industrio de CGT (Ĝenerala Labor-Konfederacio) prezentis antaŭ la forumo dum la lasta kunsida tago la problemon pri la Internacia lingvo. Li rilatigis sin al la favora eĥo, kiun vekis pasintjare la intervjuo kun S. Gáspár, ĝen. sekretario de la hungara sindikata konsilantaro, pri la utileco de Esperanto en la internaciaj rilatoj de laboristoj kaj sindikatanoj.

La lingva problemo, diris i. a. P. Levi, postulas seriozan pripenson enkadre de TSF, plue en Internacia Konfederacio de Liberaj Sindikatoj kaj en Tutmonda Konfederacio de Laboro. Ĉiuj sindikatoj interesitaj povas integrigi E-on en siaj kulturaj aktivecoj, por internaciskala etendo de la sindikataj rajtoj kaj por faciligi la reciprokajn rilatojn.

En sia referaĵo li pledis por integriĝo de laborulaj postuloj frunte al la kapitalisma krizo kaj danĝeraj manovroj de la multnaciaj societoj. Al la interveno pri IL venis kelkaj reagoj; la hungara kaj greka delegitaroj varme subtenis ĝin ili intencas progresigi la aferon sur konkreta tereno, opiniante krei specialan komisionon sur la nivelo de UITBB aŭ tiu de TSF. Aliaj delegitoj evidentigis per sia sinteno ĝenerale, ke ili apenaŭ konscias pri la problemo. Diversaj estis ankaŭ reagoj de la interpretistoj.

La estraro de UITBB, kiel konfirmis s-ro Levi, konsideris la proponon de la hungara delegitaro „ne la ĉefa, sed grava". Espereble, tiu ĉi pozitiva starpunkto de UITBB influos iniciatojn por IL en la aliaj sindikataj organizaĵoj. (kni)

(El „Starto", organo de ĈEA, 6/1975)

(resto de p. 3)

Fino al la vetarmado — por ke la paco estu defendata kaj nova mondo konstruata!

Batalu komune por malpermeso de ĉiuj nukleaj armiloj kaj aliaj amasneniigaj bataliloj!

Batalu komune por ĝenerala kaj plena senarmiĝo!

Batalu komune por baldaŭa kunvoko de mondkonferenco de UN pri senarmiĝo!

Monda Packonsilantaro
— Prezidantara kunsido —
Stockholm, la 2-an de junio 1975

Komuniko

I.

En la tagoj de la 2-a ĝis la 4-a de aprilo 1976 en Krakovo okazis la laŭvica Oka Konsultiĝo de reprezentantoj de la Esperanto-asocioj kaj movadoj en la jenaj landoj: Bulgario, ĈSR, GDR, Hungario, Pollando, SSR kaj USSR.

La Konsultiĝo traktis problemojn de la teoria kaj praktika agado de la esperantistaro en la reprezentitaj landoj.

Estis ellaborita vico da rekomendoj al la koncernaj LA por pritraktado kaj realigado.

Specialan atenton oni turnis al la letero de la antaŭstaranta en proksima julio (u. Ruse, Bulgario) Sepa Ĝenerala konferenco de Mondpaca Esperantista Movado kaj al la plua plibonigo de la redaktado kaj eldonado de ties revuo „Paco" utiligante por tiu celo la dokumentojn de la Konferenco en Helsinki (1975) kaj la pacproponojn ellaboritajn de la 25-a kongreso de komunista partio de Sovetunio kiel ankaŭ la venontjaran Mondan Packongreson en Varsovio.

Oni pridiskutis ankaŭ vicon da taskoj en la sfero de la praktika kunlaboro de la koncernaj LA.

En la tagordo figuris ankaŭ la temo pri la parlamenta kaj regiona agadoj en la socialistaj landoj lige kun la programo pri similaj agadoj de Universala Esperanto-Asocio.

Estis traktitaj iuj sciencaj kaj teoriaj problemoj kiel ekz. pri ellaboro de fundamentaj sciencaj materialoj rilate la staton kaj evolutendencojn de la problemoj de Internacia Lingvo, kunlaborado kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvoproblemo (CED) k. a.

Oni prenis decidojn pri la preparo de la venontjara Naŭa Konsultiĝo.

La Prezidumo de Pola Esperanto-asocio aranĝis amikan akcepton por la partoprenintoj en la konsultiĝo.

II.

La Konsultiĝon partoprenis ankaŭ reprezentantoj — gvidantoj de la Junularaj Sekcioj de la koncernaj LA, kiuj pritraktis komunajn kaj specialajn problemojn de la junulara esperantista movado en socialismaj landoj.
La reprezentantoj informiĝis reciproke pri la strukturo kaj atingoj en siaj landoj por trovi pli konvenan bazon por kunordigi la estontan agadon.
Oni esprimis deziron kaj pretecon plifirmigi la kontaktojn inter la junaj esperantistoj cele al pli vasta amikeca kunlaboro inter la junularo de la socialismaj landoj por komunaj celoj.
Elirante el la fakto, ke la konsultiĝo de la junularo estis tre fruktodona, ĉiuj reprezentantoj de la junularaj sekcioj de la socialismaj landoj interkonsentis, ke valoras kaj necesas daŭrigi la partoprenon de la junularo en la sekvontaj laŭvicaj konsultiĝoj.

* * *

Estas petataj ĉiuj esperantistaj kaj aliaj informorganoj publikigi parte aŭ entute tiun ĉi komunikon.

Krakovo, Pola Popola Respubliko
5. 4. 1976

András Sugár

Ĉe komenco de nova, rapida prospero

Interparolo kun la prezidanto de la sovetaj esperantistoj en Moskvo

Mahomed Isajev, la prezidanto de la komitato okupiĝanta pri la internaciaj interrilatoj de la sovetaj esperantistoj, estas 48-jara scienculo, devenanta el la Nord-Kaŭkaza oseta gento. La oseta kaj la tadĵika lingvoj apartenas al la persa lingvofamilio. Tio estas la kaŭzo, ke Mahomed jam de infanaĝo estis altirita al la studado de la iranaj lingvoj.

— Al Esperanto mi venis per la lingvoscienco — li diras. — En mia libro „Lingvo kaj nacio“ la lasta ĉapitro traktas la lingvon de la estonteco. En ĝi mi eksplikas, ke la internacia lingvo de la estonteco povos esti nek iu el la ekzistantaj naciaj lingvoj, nek la „natura“ miksaĵo de la hodiaŭaj naciaj lingvoj. La kunfandiĝo de la disvolviĝintaj lingvoj estas praktike neebla. La ĝisnuna historio de Esperanto estas unusola grandega kaj sukcesa eksperimento: pruviĝis, ke artefarita lingvo estas vere ebla, ĝi ekzistas kaj floras. Miaj kolegoj sciencistoj ofte demandas, ĉu estas eble esperantigi ekz. Puŝkin-on. Kiam anstataŭ respondo mi deklamas al ili iun poemon de Puŝkin, ili kapitulacas. Belege — ili diras.

Kaj ĉu la rusa lingvo?

— Kiel soveta homo, ĉu vi ne pensas, ke la rolo de la internacia lingvo atendas la rusan lingvon, — mi demandas.

— Ne, nome pro pluraj principaj kaj praktikaj kaŭzoj. Lenin malaprobis ankaŭ tion, ke la rusa estu la ŝtata lingvo de Sovet-Unio. Rigardu, jen vi trovas en la 24a volumo de la Lenin-kolekto, sur la paĝo 294 la sekvantan artikolon de Lenin: „Ĉu estas necesa deviga ŝtata lingvo? La deviga ŝtata lingvo estas bastono kaj per bastono oni povas peli neniun en la paradizon — skribas Lenin.

La rusa restos ankaŭ plu la natura peranta lingvo inter la naciaj kaj gentoj en nia lando kaj mi scias, ke ankaŭ eksterlande multaj lernas ĝin. Sed la rolon de unika internacia lingvo ĝi ne povos ludi, same kiel nek la angla, nek la franca aŭ hispana.

Interlingvistiko?

— En la lingvoscienca instituto de la Soveta Scienca Akademio vi estas la prezidanto de la „grupo por la problemoj de la interlingvistiko“. Pri kio okupiĝas tiu grupo?

— Pri la demando de la internaciaj lingvoj. Nia grupo ekzamenis pli ol sescent projektojn kaj lingvo-sistemojn, inkluzive de Interlingua, Ido kaj diversajn natursciencajn eksperimentojn por la kreo de internacia faklingvo. Eĉ estis ankaŭ pluraj sovetaj aŭtoroj, kiuj kreis novan internacian lingvon. Ekzemple Juŝmanov, la elstara arabologo ellaboris artefaritan lingvon kun la nomo Etem (ekonomi tempor, energi, medi). Nia laborgrupo rifuzis ĉian provadon kaj konkludis, ke inter la 600 projektoj sole Esperanto estas vivkapabla, eĉ: perfekta internacia lingvo.

— Kaj kio estas la „oficiala“ opinio, se tia ekzistas?

— La prezidantaro de la Scienca Akademio en 1973 faris decidon de historia signifo. Ĝi estis vera trabato tra la fonto. Tiam fondiĝis ankaŭ nia laborgrupo; pri ĝia konkludo pli frue mi jam parolis. Ekde la decido de la Scienca Akademio jam neniu povas nomi la esperantistojn iaj kapricaj hobiuloj aŭ stranguloj.

— Jes, sed vi bone scias, ke la disvastiĝon de Esperanto oni ne povas efektivigi per decidoj. Ja multaj estas la obstakloj ...

— Rigardu, juna planto rapide disvolvas siajn branĉojn, kaj se la cirkonstancoj estas favoraj, ĝi bone kreskas. Sed se oni rompas la trunkon de la disvolviĝanta arbeto, poste multe pli malfacile ĝi kreskos plu.

— Do, pli konkrete?

— La nutra grundo de Esperanto estas la paco, la evoluo de la internaciaj rilatoj. En militaj tempoj malmultaj lernas internacian lingvon. La unua plago, kiu trafis Esperanton, estis la unua mondmilito. En nia lando tiun plagon ĝi rapide transvivis kaj post la revolucio ĝi bele ekprosperis. Poste denove venis tempoj pli malfacilaj, kaj nun mi ne pensas nur pri la konataj subjektivaj kialoj, sed unuavice pri la nova objektiva malfeliĉo: pri la dua mondmilito, kaj poste pri la jaroj de la malvarma milito. La komenco de la renesanco estis en 1957 la Renkonto de la Tutmonda Junularo en Moskvo kiam ni formis junularan esperantistan grupon. De tiam la evoluo estas seninterrompa kaj rektalinia, sed pri tio ni tute ne povas esti kontentaj. Miaopinie en nia lando Esperanto staras ĝuste nun ĉe la komenco de sia florado, de sia plej granda evoluo.

— Kial ĝuste nun?

Lingvokomisarioj

— Mi klarigos ĝin. En la unuaj jardekoj de la soveta reĝimo oni devis oferi ĉiujn lingvistikajn fortojn, talenton kaj ambicion al la disvolvo de la 130 naciaj lingvoj de la lando. Dum dek jaroj per nekredebla energio oni kreis kvindek literaturajn lingvojn! Por komparo, jen la hodiaŭa Afriko, kiun ankaŭ vi bone konas: tie eĉ eksperimenton oni ne faras por

krei la alfabetismon de kelkaj triboj kun centmil aŭ miliono da membroj, sed trudas devide la anglan aŭ francan lingvon, kvankam la plimulto de la loĝantaro eĉ ne komprenas ĝin. Ĉe ni la konstruado de la lingvoj estis same tiel grava ŝtata, eĉ partia tasko, kiel la industriigo. La gvidantoj de la lando, Kalinjin, Mikojan kaj aliaj de tempo al tempo vojaĝis al la tero de tiu aŭ alia gento en ofico de „alfabetismo-kreaj komisaroj" (komisar po sozdaniju pismennosti) kaj ekhavis literaturan lingvon ankaŭ multaj nacioj nombrantaj apenaŭ du-tri mil animojn. Tiu laboro hodiaŭ estas jam sukcese finita. Ofte malgranda popolo simple rezignas pri sia literatura lingvo, ĝiaj lernejoj malpleniĝas, la gepatroj enskribigas siajn infanojn en lernejojn, kie oni instruas en lingvo de pli granda popolo.

— Kie troviĝas tiaĵo?

— Ekzemple en la montaro Pamir dek gentoj kalkulis sume kvardekmil animojn. Ilia lingvo similas al la tadĵika. Nun la ruŝana, la bartanga kaj ok aliaj gentoj — sen ajna desupra premo — decidis rezigni pri sia lingvo kaj aliĝi al la tadĵika. Jen la deziro de la gepatroj iliaj lernejoj jam pli frue iom post iom transiris al la tadĵika. Ĉion ĉi mi rakontas, por ilustri, ke ĉe ni la problemo de la naciaj lingvoj jam solviĝis kaj la grandega lingvistika forto de dekmil sciencistoj, interesiĝantoj kaj amatoroj serĉas novan taskon. Niaj internaciaj interligoj floradas, la mondpaco regas de tridek jaroj kaj ĝiaj perspektivoj estas tre bonaj. Estas donitaj do ĉiuj kondiĉoj por la rapida prosperado de Esperanto kaj ĉiam pli oni sentas la interesiĝon, la scivolon, eĉ, mi diras: la soifon de la publika opinio por nia lingvo.

Kiom da esperantistoj vivas en Sovet-Unio?

— Neniu scias tion precize. La kreaĵon de Bokarev, la Esperanto-rusan vortaron, aperintan en sepdek-mil ekz-oj, dum minutoj oni disportis, kiel varmegan „piroĵki"-on (buŝto farĉita per viando) en vintro... Lokaj radio- kaj televido-stacioj dissendas kursojn.

Li aldonis, ke jam maturiĝas la planoj pri la fondo de la Soveta Esperanto-Asocio. La popularеco de la lingvo alternas laŭ regionoj. Estas strange, ke ekzemple unu el la plej grandaj esperantistaj centroj estas la Siberia urbo Barnaul — onidire en la caraj tempoj ekzilito disvastigis tie la lingvon. En Ufa, la ĉefurbo de Baŝkirio, la vespera gazeto publikigas kurson, en Baltiko plej antaŭe estas Litovio, sed ankaŭ Latvio kaj Estonio ne tre postrestas. Belajn rezultojn atingis la armenaj esperantistoj kaj interese, ke la moskvanoj estas nur en la tria-kvara loko. Multaj eldonoj aperas. Oni ofte publikigas en Esperanto la verkojn de Jesenin, Puŝkin, Ŝoloĥov kaj Gajdar, la oficialan materialon de la Soveta Komunista Partio kaj la paroladojn de Breĵnev. Ĝis nun oni sinkronizis tri filmojn en la internacian lingvon (Lenin; Mia Dagestano; La tero, kiun mi amas). Estas pretigata ankaŭ kvara filmo.

— Kun granda interesiĝo mi aŭdis pri la deklaro de kamarado Sándor Gáspár — li daŭrigas — kaj pri tio, ke la hungaraj sindikatoj volas fari Esperanton la interkomunika lingvo de la internacia laborista movado. Se tio sukcesos, baldaŭ oni komprenos, ke per tio — krom la ideaj avantaĝoj — oni povas efektivigi grandegan ŝparon de elspezoj! Tiu iniciato estas saĝa, kuraĝa kaj precipe: venis en ĝusta tempo, ĝi meritas ĉian apogon.

(El Hungara Vivo 4/75)

D-ro István Szerdahelyi

Planlingvistika dokumentaro I

En tiu ĉi nia numero ni lanĉas novan r u b r i k o n. Ĝia celo estas: ĝustigi, korekti kaj kompletigi la Dokumentaron de la ĝisnunaj planlingvistikaj (interlingvistikaj) fontverkoj.
Niaj legantoj estas petataj sendi al ni similajn indicojn.
Uzataj mallongigoj:

S = P. E. Stojan, Bibliografio de Internacia Lingvo, Genève, 1929, foto, represo: 1970 (Olms) Hildesheim
D = E. Drezen, Historio de la Mondlingvo, Leipzig, 1931.
C₁ = L. Couturat, L. Leau, Histoire de la Langue Universelle, Paris, 1907.
C₂ = —, Les nouvelles Langues Internationales, Paris, 1907.
M = M. Monnerot-Dumaine, Précis d'Interlinguistique générale et spéciale, Paris, 1960.

1. GÁTI István

S, No. 5706, p. 473; **D** p. 70 (piednoto Nero 4.); **M** p. 172. En ĉiuj tri fontoj nekompleta kaj erara indico. Korekti:
A Stenographianak I-ső könyve. A' Tachygraphia vagy Szapora irás módja, mellyet mint a' Pasigraphiának Philosophica vagy Universalis nyelvnek is első vonásait, közre bocsát zsengeképpen Gáti István, Pesten, Trattner János Tamás betüivel 1820.
En 1893 D-ro László GOPCSA trovis en la Hungara Nacia Muzeo neeldonitan manuskripton de GÁTI, kies titolo estas:
Stenographia Tachygraphia Pasigraphia Universalis Lingua Rövid Foglalatja, 1824.

Biografiaj notoj:
Naskiĝis en 1749, Mánd, mortis en 1843. Debrecen; kalvinana pastro, ekde 1800 juĝisto, la fondito de hungara stenografio.

Bibliografio:
VIKÁR Béla, Gáti István stenographiája, kapcsolatban a modern stenographiával, Budapest, 1889. Aperis en: Magyar Tudományos Akadémia „Értekezések a nyelv és széptudományok köréből", vol. XIV., N-ro 12.

2. KOVACSHÁZI István

S N-ro 850a, p. 115.; **D** p. 95. Nekompletaj indicoj. Kompletigi: Pantographia (Egyetemes Irás). Irta Kovácsházi István. Pantographia (écriture universelle) par Stephen Kovácsházi, Budapest, 1877.
Noto: La verketo aperis en du lingvoj: hungare kaj france.

3. DOHNÁNYI Frigyes

En la fontoj mankas.
Panstenographia. Minden nyelvre való gyorsirás. Különös tekintettel a magyar és a német valamint a szláv és latin nyelvre, iskolák számára és magánhasználatra irta Dohnányi Frigyes, gymn. tanár. Pozsony-Budapest, 1876.

Biografiaj notoj:
Naskiĝis en 1843. Sobitist, mortis en 1909, Pozsony. Gimnazia instruisto de matematiko, fiziko kaj stenografio. Okupiĝis pri kreo de artefarita aposteriora lingvo kaj korespondis kun H. MOLENAAR kies lingvoprojekton li principe akceptis.

Bibliografio:
Kumlik Emil, Dohnányi Frigyes, Budapest, 1937. **(daŭrigota)**

Turismaj aranĝoj 1976 (III)

Ni daŭrigas la informadon pri turismaj esperantistaj aranĝoj 1976 (komparu la listojn en „der esperantist“ 1—2/76)

Signifo de la uzataj mallongigoj en la kalendaro:

N: Nomo de la aranĝo
T: Temo de la aranĝo
O: Organizanto de la aranĝo
K: Korespondadreso
P: Prezo
A: Aliĝdato
R: Rimarkoj
JA: Junulara aranĝo

Bulgario

18. 8. — 29. 8. 1976 — Velingrad
N: Internacia Esperantista Ferio
OK: ĉe Manol Ĉolev, Br. Krastini 14, BG—4600 Velingrad
P: 72 levoj
17. 9. — 24. 9. 1976 — Pamporovo
N: Ora Esperanto Feriado
OK: DK de BEA, Pf. 30, Smoljan

ĈSSR

4. 7. — 17. 7. 1976 — Lanĉov
N: Junpionira Esperanto Tendaro
OK: Esperanto-Klubo de ĈEA, pk. 72, CS—674 01 Třebič
18. 7. — 24. 7. 1976 — Meza Slovakio
N: Kultura Turisma Esperanto-Semajno/Festivalo
OK: Ernesto Vana, CS—962 71 Dudince/Slovakio
18. 7. — 31. 7. 1976 — Lanĉov
N: Somera Esperanto-Tendaro
OK: Esperanto-Klubo, loka grupo de ĈEA, CS—674 01 Třebič
1. 8. — 14. 8. 1976 — Lanĉov
N: Somera Esperanto Tendaro
OK: Esperanto-Klubo, loka grupo de ĈEA, CS—674 01 Třebič

Hungario

17. 8. — 22. 8. 1976 — Budapest — Balaton — Danubo
N: 5a Internacia Varia Semajno (VIS)
OK: BTK de HEA, H — 1443 Budapest, Pf. 153

Pollando

13. — 14. 11. 1976 — Bydgoszcz
N: 4-a Internacia Trarigardo de Lumbildoj
T: Esperanto-Somero 1976
OK: Klubo Esperanto, str. M. C. Sklodowskiej 10/4, PL—85—094 Bydgoszcz
27. 12. 1976 — 2. 1. 1977 — Gdansk, „JA“
N: Junulara Esperanto Feriado
OK: Klubo „Esperanto“, 80—150 Gdansk 6a, str. Legnicka 2/1

Turismo en Bulgario

INTERNACIA EKSPOZICIO „LA TURISMO EN KARIKATUROJ"

Kelkaj bulgaraj membroj de Monda Turismo pretigas internacian ekspozicion „LA TURISMO EN KARIKATUROJ". Dank' al la alvoko aperigita en la esperantista gazetaro multe da personoj sendis al la pretigantoj de la ekspozicio karikaturojn pri turismo aperintajn en landaj kaj lokaj gazetoj kaj revuoj. La kolektado de karikaturoj daŭras, ĉar la ekspozicio finpretigita devas havi karikaturojn sur 50 paneloj.

Oni intencas ĉi jare montri parton de la ekspozicio dum la Internacia Renkonto Naturamika kun konferenco de Monda Turismo en Abaliget, Hungario kaj la 3-a Internacia Arkeologia Esperanto-Brigado en u. Marica, Bulgario.

ENPENETRO DE ESPERANTO EN LA INTERNACIA TURISMO

Dum la somero 1976 la porjunulara vojaĝoficejo „JUVENTUR" en Bydgoszcz, Pollando, organitas en kunlaboro kun landaj Esperanto-asocioj buslinion ESPERANTO, kiu funkcios inter Bydgoszcz kaj Budapeŝto. JUVENTUR kaj la Distrikta Komitato de Bulgara E.-Asocio, Smoljan, subskribis kontrakton pri starigo de internacia aviadil-buslinio ESPERANTO kiu funkciu inter Pollando kaj Bulgario por interŝanĝo de feriantaj esperantistoj. Laŭ la kontrakto ĉirkaŭ 1000 polaj esperantistoj ferios en Bulgario kaj 300 bulgaroj en Pollando. Oni veturos per la aviadilo D-RO L. ZAMENHOF. Se vi deziras ferii en Pollando aŭ Bulgario petu informojn de: JUVENTUR, str. Jagelonska 12, PL—85—067 Bydgoszcz, Pollando aŭ DISTRIKTA ESPERANTO-KOMITATO, P. K. 30, Smoljan, Bulgario.

3-a INTERNACIA ARKEOLOGIA ESPERANTO-BRIGADO (IAEB)

De la 8-a ĝis la 31-a de aŭgusto 1976, en urbo Marica, Distrikto de Haskovo, Bulgario funkcios la 3-a Internacia Arkeologia Esperanto-Brigado „D-ro L. Zamenhof". La brigadon partoprenos 120 bulgaraj kaj alilandaj geesperantistoj, precipe junuloj kaj studentoj. Oni laboros sep horojn ĝis tagmezo por malkovri la sekretojn de la antikva fortikaĵo ASARA, kiu situas en la ĉirkaŭaĵo de la urbo Marica.

La brigadanoj loĝos en komuna loĝejo. Ili ricevados ĉiutage kvarfoje manĝadon, laborveston kaj uniformon. Postagmeze kaj vespere la brigadanoj ĝuados varian kaj distran programon: prelegoj, projekciado de diapozitivoj, lernado de Esperanto-kantoj, karnavalo, grupaj ludoj, sportaj k. a. konkursoj, perfektiga Esperanto-kurso, amuzvesperoj, dancado k. a.

Per aŭtobusoj oni veturos al pitoreskaj lokoj kaj vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo de urboj Haskovo kaj Marica. Post la fino de la brigado ties partoprenantoj senpage ferios kelkajn tagojn ĉe la bordo de Nigra Maro. Oni povas aliĝi al la brigado ĝis la 10-a de majo k. i. Se vi deziras ricevi pli detalajn informojn skribu al: Stabo de la 3-a IAEB, P. K. 66 1000-Sofio, Bulgario.

Jen la kampadejo!

Kiel ni informis en „der esperanist“ 1 kaj 2/1976, de 5a ĝis 18a de septembro esperantistoj renkontiĝos ĉe Berlin sur la Internacia kampadejo Berlin-Krossinsee. Jen la situo de la kampadejo, kiun desegnis R. Hahlbohm.



Parnaso — 76

Riga Junulara Esperanto-Klubo organizas poezian konkurson Parnaso 76. La celo de la konkurso estas pliaktivigi junajn Esperanto-poetojn kaj ĉiujn, kies koro junas, kiuj ne povas silenti pri beleco de la nuna vivo, pri amo, mirinda naturo kaj nia movado.
Ĉiuspecajn originalajn poeziajn verkojn laŭ libera temo oni sendu ĝis la 15a de junio 1976 al: Aristida Mediņš, 226 002 Riga 2, Ed. Smilga 34 — 5, Latvio, USSR.

Bonan inspiron al ĉiuj.

Poezia fako de Riga Junulara Esperanto Klubo

L. Solovjov

Anekdotoj pri

Hoĝa Nasriddin Afandi III

Tradukis Petro Poliŝĉuk, Taŝkent

Nova fonto por la vivteno de Nasriddin Afandi

Pro sia spriteco Nasriddin Afandi akiris la favoron de la padiŝaho kaj la honoron esti invitata al la kortego.

Iufoje, en la poŝo de Nasriddin Afandi restis eĉ ne unu monero kaj li decidis sin turni al la reganto por helpo. Sed kiel ofte okazas ĉe la regantoj, la padiŝaho estis ĉitage en malbona humoro kaj la pordo de la

trezorejo. restis fermita por Afandi. Do, la saĝulo revenis hejmen sen io ajn.

La sekvintan tagon, revenante post la ĉasado hejmen, la padiŝaho ekmemoris ke li malfavore kondutis rilate al Nasriddin Afandi kaj decidis ĝojigi lin per mono kaj ĉasaĵo, kiun li abunde ĉasis. Tiucele li direktis sian vojon al la korto de Afandi. Kiam li alveturis la korton, li ekaŭdis la sonojn de gajaj kantoj kaj krioj de festenantoj. La padiŝaho, kun mirego, eĉ distingis la voĉojn de plej famaj kaj eminentaj kantistoj de la urbo. „Vere, en tio ĉi estas ia speco de mistero", ekpensis la padiŝaho, „ja, nur hieraŭ Afandi plendis, ke li ne havas monon por aĉeti eĉ la panon por siaj infanoj. Do, de kie li prenis la monon por tiu ĉi festeno? Certe li okupiĝas pri ŝtelado. Morgaŭ estos necese nepre esplori la aferon". Decidinte tiel, la padiŝaho veturis en la palacon ne vizitinte la domon de Afandi kaj la postan tagon alvokis la saĝulon kaj demandis lin: „De kie vi prenas la monon por la festenoj, Afandi? Diru nur la veron! Ja vi ĉiam plendas pri via malriĉeco?!"

„Mi nur povas diri al vi, ho kara kaj granda padiŝaho, ke tiu ĉi mono ne estas prenita el via trezorejo."

Pli kaj pli koleriĝante, la padiŝaho ekkriis: „Diru la veron! Se vi ne diros al mi, de kie vi prenas la monon, mi tuj vokos la ekzekutiston!"

Afandi ekridetis. „Mi diros, ho mia kara padiŝaho, mi diros! Post kiam vi fermis antaŭ mi la pordegon de via malavareco, por mi nenio alia restis ol elpensi ian ajn rimedon por vivteni min kaj miajn geinfanojn. Mi komencis veti kun diversaj homoj je grandaj monsumoj kaj mi sukcesis multe gajni. Se vi deziras, mi estas preta veti eĉ kun vi, ho mia kara kaj granda padiŝaho!"
„Pri kio ni vetu?", demandis ekinteresiĝinte la reganto.

„Morgaŭ, ĝuste je la tagmezo, sur la malantaŭa mola loko de la korpo de mia benata padiŝaho, aperos grandega furunko. Se ne, mi pagos al vi la vetsumon." „Kia estu la vetsumo?", demandis la reganto. „Estu ĝi cento de oraj moneroj", respondis Afandi. „Mi obeas, mia kara kaj amata padiŝaho, estas, do, interkonsentite!"

Ili premis reciproke la manojn kaj Afandi revenis hejmen. Sed la padiŝaho eĉ ne fermis la okulojn dum la tuta nokto. Ĉiumomente li palpis sian postaĵon; ĉu ne kreskas tie furunko? La furunko aperis nek matene, nek je la tagmezo. Ekĝojis la padiŝaho kaj ordonis seli la ĉevalon. „La fanfaronulo Afandi malgajnis," ĝojegis li, „jen mi montros al li! Ni vidu de kie li prenos tiun centon da oraj moneroj!"

Kun granda estimo Afandi renkontis la reganton ĉe la pordo de sia hejmo kaj salutis lin per humila kapklino, riverencinte al li.

„Nu, Afandi, ja mi nenian furunkon havas! Tuj pagu al mi la malgajnitan centon da oraj moneroj!"

„La cento da oraj moneroj atendas mian suverenon", respondis Afandi, „sed mi devas rigardi propraokule, ke la furunko ne kreskis. Bonvolu eniri en la gastoĉambron." Kondukinte la padiŝahon en la domon, li petis lin stari dorse al fenestro kaj senvestiĝi. Ridante, la padiŝaho plenumis la peton de Afandi kaj triumfante ekkriis: „Nu, Afandi, ĉu nun vi jam certiĝis pri tio, ke vi malgajnis la veton?"

„Vi estas prava, via moŝto! Jen estas via cento da oraj moneroj, respondis Afandi, respektoplene etendante al li la monujon.

Kontenta pri tio, ke li superruzis la plej ruzan saĝulon, la padiŝaho prenis la oron kaj forveturis en la palacon.

La sekvintan tagon la padiŝaho eksciis, ke en la hejmo de Afandi estis aranĝita festeno, eĉ pli pompa ol la antaŭa. La mirigita padiŝaho

alvokis Afandi kaj demandis lin: „Aŭskultu, do, Afandi, nur hieraŭ vi malgajnis al mi centon da oraj moneroj kaj ... aranĝas la festenon. Eble vi mistifikas min?

„Ĉu mi povas tion permesi al mi, mia padiŝaho?, respondis Afandi plej respektoplene. „Mi estas saĝa! Estas vere, ke mi vetis kun vi kaj malgajnis, sed samtempe, mi vetis je samaj monsumoj kun dudek personoj kaj gajnis du milojn da oraj moneroj.“ „Pri kio, do, vi vetis kun tiuj personoj“, demandis la reganto. „Mi vetis kun ili, ke mi montros al ili, tra la fenestro de mia hejmo, la postaĵon de via moŝto.“

Aŭdinte la klarigon de Afandi, la padiŝaho multe ridis kaj diris: „Kvankam tiuj dek mil oraj moneroj, kiun vi de nun ĉiumonate ricevados estas nenio kompare kun via saĝeco, mi tamen petas vin, ke vi tion akceptu kiel signon de mia respekto al vi!“

Ĉu povas morti kaldronoj?

Nasriddin Afandi pruntepreni de sia riĉa najbaro grandan kaldronon, kaj post dusemajna uzado redonis ĝin al la posedanto, aldoninte ankoraŭ unu malgrandan kaldronon. La mirigita najbaro demandis, kial Afandi donas al li la duan kaldronon. „Vi ne miru, kara najbaro, via kaldrono naskis la malgrandan, dum ĝi estis en mia hejmo“, respondis Afandi. Kompreneble, la najbaro akceptis ĝoje la duan kaldronon.

Post iom da tempo, Afandi denove petis la najbaron pruntedoni al li la grandan kaldronon, kaj tiu volonte ĝin donis al Afandi.

Pasis multe da tempo, sed vane la najbaro atendis la kaldronon. Afandi ŝajnis forgesi pri tio, ke estas necese redoni ĝin. Tiam la najbaro vizitis la hejmon de Afandi kaj diris al la lasta: „Estimata Afandi, vi forgesis redoni la grandan kaldronon, ja la malgranda kaldrono ploras pri sia patrino.“ „Ho, ve al mi, ekploris Afandi, okazis granda malfeliĉo. Via kaldrono mortis! . . . “ „Sed, ĉu kaldrono povas morti?“ ekkriis la mastro. „Se kaldrono povas naski, kial ĝi ne povas morti?“, demandis responde la ploranta Afandi.

Perdita insuleto?

Perdita insuleto en la vasteco de la Esperanto-movado: Kubo. Fermu viajn okulojn kaj pensu momenteton pri ĝi. Ĉu vi faris tion? Se jes, bonvolu malfermi la okulojn kaj plulegi.

En Kubo malproksime de ĉiuj Esperantaj ĉefurboj, de ĉiuj kongresoj kaj renkontiĝoj, de ĉiuj skisemajnoj kaj vintraj feriadoj, malproksime, tre malproksime, de Roterdamo, de la ekirpunkto de revuoj kaj aliaj informiloj, nu- tie en Kubo tamen esperantistoj kapablas vivi kaj esperantumi.

Tamen ili spertas akran solecon. En letero de la prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio ni povas legi la jenon: „. . . kelkfoje ŝajnas al ni ke ni estas perdita insuleto en la vasteco de la Esperanto-movado. En nian landon ne eniras esperantlingvaj dissendoj, eksterlandaj esperantistoj estas maloftuloj kaj la neregula mara poŝto permesas al ni legi Esperantajn novaĵojn kiam ili fariĝas historio.“

Niaj kubaj geamikoj petas lernolibrojn en la hispana, librojn en Esperanto kaj revuojn, ankaŭ malnovajn kaj iom difektitajn.

Ni montru al ili kiom forta kapablas esti esperantista solidareco. Ni montru al ili, ke, kvankam vasta, la Esperanto-movado ne permesas la ekziston de perditaj insuletoj en sia sino.

La petitan materialon bonvolu sendi rekte al Kuba Esperanto-Asocio, poŝtkesto 314, Habano 1, Kubo.

Se vi volas proponi alispecan helpon, bonvolu kontakti la respondeculon de UEA pri landoj kun neorganizita movado:

Renato Corsetti, Via Strabone, 1
I - 00176 Roma, Italio.



(foto: malnova numero)

Aperis „Pola Esperantisto“

1/2 1975

Certe, la revuo de nia pola najbaro aperadas kun malfruiĝo. Tamen, la februare aperinta numero 1—2/1975 estas vere bona rezulto de lerta redaktado kaj ne perdas multe de sia aktualeco.

Menciindas la enkonduka artikolo de la nova redaktoro Jerzy Uśpieński, kiu prezentas vere tre riĉan programon por la enhavo de la revuo.

Gravaj aktualaj politikaj temoj („La jaro de la venko“ kaj „La tria korbo“ (Fina Akto de Helsinki) estas traktitaj intereskapte kaj verve. Pensigas la artikolo de la redaktoro „Esperanto kaj la eŭropa sekureco“, en kiu li, i. a. klasifas la esperantistojn en „atendemuloj“, „absolutaj neŭtraluloj“ kaj „aktivaj neŭtraluloj“. La novjara mezaĝo de la prezidanto de UEA, d-ro Tonkin, prezentas interesajn ideojn pri la plua iro de UEA.

Kaj kompreneble la virinoj ludas gravan rolon en tiu numero, ja temas pri 1975: „Ĉe la sojlo de la Virina Jaro“, „La Evoj kaj Esperanto“ de Barbara Sokalówna,

La ĝenerala sekretario de PEA, B. Staszcak, kaj la kasisto de la Ĉefa Estraro, W. Wesołowski, larĝe prezentas superrigardon pri la asocio en nia najbara lando.

T. J. Michalski pritraktas la senfine diskutatan kaj diskuteblan temon de la geografiaj nomoj.

Pri konsiderinda sukceso de la pola televido informas J. Golec kaj kun ĝojo ni retrovas sur la paĝoj de PE la studon de M. J. Isaev pri interlingvistiko (kp. „der esperantist“ n-ro 71).

Mi nur menciis la ĉefajn artikolojn, sed certe estas evidente, ke temas pri vere riĉa kaj interesa numero. Abonado al „Pola Esperantisto“ estas do rekomendinda, des pli, ĉar oni evidente rekaptos la eldonritmon.

D. B.

Popola Altlernejo instruas Esperanton

Ekde marto 1976 la popola altlernejo en la Berlina distrikto Prenzlauer Berg oficiale instruas Esperanton. La unuan kurson, gvidatan de s-ino Hella Sauerbrey, partoprenas 20 kursanoj.

„Bulgara Esperantisto“

Oficiala organo de Bulgara Esperantista Asocio (BEA),

formato 23,5 × 16,7 cm

„Bulgara Esperantisto“, analoga organo al nia „der esperantist“, aperas ĉiumonate en la amplekso de 16 paĝoj. La enhavo estas ĝenerale tre varia kaj preskaŭ ĉiam interesa ne nur por bulgaraj esperantistoj. Dominas en la gazete la konstantaj rubrikoj kiel „Heroa pasinteco“, „Organiza vivo“, „Poezio kaj beletro“ kaj „Tra la Esperanto-mondo“. Ilin kompletigas laŭokazaj aktualaj artikoloj, ŝercoj kaj koresponddeziroj. En la rubriko „Heroa pasinteco“ oni povas legi interesajn okazintaĵojn kaj travivaĵojn el la bulgara laborista Esperanto-movado, do temas pri imitinda ekzemplo, ĉu ne? La rubriko „Organiza vivo“ respegulas la rimarkindajn atingojn de niaj bulgaraj amikoj sur la kampo de la laboro per kaj por Esperanto kaj ilian firman kunlaboron kun la Komunista Partio, sindikatoj, Patrolanda fronto k. t. p. „Poezio kaj beletro“ prezentas en n-ro 7/8—75 i. a. fragmenton el la vere tre leginda historia romano „Sub la jugo“ de Ivan Vazev. Tra la E-mondo“ raportas koncize, sed multflanke kaj aktuale pri E-aranĝoj. En la rubriko „Lingvaj demandoj“ lasttempe elstaris longa artikolo sub la titolo „Interlingvistika utopiismo“ de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev. Artikoletoj por la lingva perfektiĝo kaj aktualaj informoj pri turismaj E-aranĝoj, okazontaj en Bulgario, kompletigas la enhavon.

Resume: „Bulgara esperantisto“ estas informriĉa gazeto, interesa ankaŭ por ni. Ĉar tion saman verŝajne ankaŭ niaj bulgaraj amikoj diros pri nia „d. e.“, CLR klopodu pri plejeble grandkvanta interŝanĝo de ambaŭ gazetoj.

D. Dungert

Rimarko de la red.: La revueto estas abonebla ĉe sinjorino Brigitte Thieme, 84 Riesa, Dr.-Külz-Straße 13

Plej orienta klubo

La plej orienta Esperanto-klubo de Sovetunio, kiel informis nin ties prezidanto Vladimir Sapoĵnikov, estas la novaperinta juna klubo de la urbo Krasnojarsk. En ĝi aktivas 25 membroj kaj 50 kandidatoj. La urba komsomola estraro bone subtenas la klubon.



Ĉu vi konas „HUNGARAN VIVON“?

Antau 15 jaroj, 1961, verkistoj de la fama „hungara skolo“ fondis la kulturpolitikan Esperanto-revuon HUNGARA VIVO, kiu nun apartenas al la plej bonaj kaj interesaj periodaĵoj en Esperantujo. Al ĉiu progresinta esperantisto, kiu strebas al plua lingva perfektiĝo kaj kiu serĉas interesokaptan legaĵon mi varme rekomendas aboni al „HV“.

Ni ĉiuj konas la nur tro oftan malsanon de E-periodaĵoj: amatora redaktado, modesta ekstera kvalito, pure verdfamiliaj sciindaĵoj. La revuo HUNGARA VIVO estas escepto. Ĝi estas vere reprezentativa organo, samkvalita kiel bonaj naciaj kulturpolitikaj revuoj (32 paĝojn A 4, brila papero, riĉe ilustrita). Ĝia celo estas informi **per** Esperanto pri multflankaj temoj.

Centra temo estas Hungario — ĝia pacpolitiko, scienco, tekniko, historio, naturo, belarto ktp. Sed same detale ĝi informas pri la Esperanto-movado kaj -historio, pri originalaj prozo, dramo kaj poezio. Rezencoj, leterkesto, humuro kaj krucvortenigmoj distras post serioza studado.

La lingva kvalito estas elstare bona (ĉefredaktoro: M. Gergely, lingva revizio K. Kalocsay*). La aŭtoroj apartenas al la plej famaj hungaraj Esperantistoj-verkistoj (K. Kalocsay, J. Baghy, P. Balkańyi, L. Tárkony, F. Szillagy, S. Szathmári por nomi nur kelkajn) aŭ al la eksterlanda aro de famuloj kiel W. Auld, R. Rossetti, M. Boulton, R. Schwartz ktp.

HUNGARA VIVO kompreniĝas kiel posteulo de LITERATURA MONDO, kiu 1922—1926 (manko de mono), 1931—1939 (mondmilito) kaj 1947—1949 (malvarma milito) ludis centran rolon en la E-gazetaro, cetere same sub lingva gvidado de la majstroj de la lingvo K. Kalocsay kaj P. Balkányi. Kelkaj legantoj plendas pri tro da neologismoj kaj troa malfacileco. Certe HV ne estas legaĵo por komencanto, sed ĝi celas esti literature valora, lingve altkvalita kaj modela por ĉiu progresema, lernema esperantisto. HUNGARA VIVO aboneblas per poŝta gazetara servo de GDR (indeksnumero 25.377), aperas dumonate kaj unu kajero kostas 2,20 M. Dezirindas, ke laŭeble multaj esperantistoj jam baldaŭ pligrandigu la rondon de la amikoj de HUNGARA VIVO.

Linde Knöschke

*) La 27. 2. 1976 ĉesis bati la koro de la granda Kalman Kalocsay. En la sekvonta numero aperos ampleksa honorigo kaj prezento de lia verko.

La red.

GDR - numero de „Paco“ 1975

Jen la ĉefa enhavo de tiu-ĉi lukse presita kaj riĉe ilustrita 40 paĝa kajero, kiu estas havebla ĉe Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR (DDR — 108 Berlin, Charlottenstraße 60):

— Eŭropa sekureco kaj kunlaboro

— Post Helsinki — senarmigon!

— S. Ostrovoj: Versoj pri la plej terura

— B. Brecht: Anakronisma procesio aŭ libero kaj democracy

— R. Graetz: La 30-jara datreveno de liberigo de la faŝismo kaj la Baltmaraj Landoj

— L. Schödl: Wilhelm Pieck, unua prezidanto de la Germana Demokratia Respubliko

— R. Hahlbohm: La virina problemo en la historio kaj la Internacia Jaro de Virino

— G. Korotkeviĉ: El la vivo de ardanta homo (Lunaĉarski)

— R. Hahlbohm: La Germana Kamparana Milito

— Thomas Mann: La fino de Cipolla (el Mario kaj la magiisto)

— B. Brecht: Kantoj el la „Trigroŝa Opero“

— H. Sauerbrey: Esperanto-Literaturo, ŝtoneto en la mozaiko de la paco (3 paĝoj)

— D. Blanke: Pri la kontribuo de la laboristaj esperantistoj por la evoluo de la germana soveta amikeco en la tempo de la Respubliko de Weimar (6 paĝoj)

— D. Blanke: Oceanoj da informoj (2 paĝa recenzo pri „Esperanto en perspektivo“)

— Kelkaj informoj pri la atingoj de la esperantistoj en la Germana Demokratia Respubliko (3 paĝoj)

— R. Graetz: Kelkaj pensoj pri la 60a Universala Kongreso de Esperanto

Krome prilingvaj kontribuoj de Jiři Kořínek kaj Henrik Seppik kaj recenzoj pri diversaj verkoj en Esperanto.

Esperanto-Zeltlager in „Intercamping-Krossinsee“

Anmeldescheine und Informationen über das Esperanto-Zeltlager in „Intercamping-Krossinsee“ bei Berlin, das vom Bezirksarbeitskreis Esperanto Berlin betreut wird, sind beim Zentralen Arbeitskreis zu haben. Das Zeltlager findet vom 5. bis 18. 9. 1976 statt. (Vgl. „der esperantist“ 1 und 2/1976.)

10-a Seminario por kursgvidantoj

Jam 10-foje la honoroficaj kursgvidantoj kaj funkciuloj de la Esperanto-grupoj en Kulturligo, aŭ tiuj, kiuj pretas fariĝi tiaj, tutan (2.–7. 2. 1976) semajnon pasigis en la luksa ripozdomo kaj klerigejo de Kulturligo en Bad Saarow, ĉe Scharmützellago. 25 seminarianoj aŭskultis prelegojn, spertinterŝanĝis ĝis nokto-mezo, amuziĝis, festis kaj ekskursis. Ĉio-ĉi kreis la aparte stimulan kaj agrablan atmosferon, konatan pri tiuj seminarioj. Altajn kapablojn (ĉion kompreni) postulis la prelego de redaktoro Jerzy Grum de Radio Varsovio (kp. paĝo 22) pri la kulturpolitiko en Pollando, la agado de la Esperanto-redakcio de Radio Varsovio kaj ĝenerale pri la pola movado. La prezidanto de CLR, Rudi Graetz, traktis la aktualajn taskojn, problemojn kaj tendencojn en la agado de la esperantistoj de GDR. Krome li prezentis lumbildojn pri arabaj landoj kaj pri Mongolio. Hans Heinel, membro de la prezidiumo de CLR, verve skizis la problemojn ĉirkaŭ kaj post Helsinki, solvendajn en la politika kontraŭimperiisma batalo. D-ro Till Dahlenburg tutan tagon aŭskultigis kaj vigligis la seminarianojn pri problemoj de la Esperanto-instruado. La sekretario de CLR kaj gvidanto de la seminario, Detlev Blanke, kaj kiel tia bonege subtenata de s-ino Hanna Scheffs, mem transprenis kelkajn prelegojn. Tio estis pri la aktualaj ideologiaj kaj fakaj evolutendencoj kaj problemoj en la internacia Esperanto-movado kaj komparo pri la komunikadaj kapabloj de Esperanto kaj de la germana lingvo (ĉe la ekzemplo de la vortfarado). Kompreneble oni ne forgesis organizi dignan kaj ĝismatenan adiaŭan balon. Laŭdinda estas la fakto, ke du seminarianoj, s-ro Böttcher el Leipzig kaj s-ro Herr el Potsdam ĉiutage gvidis lingvajn ekzercojn. S-ino Linde Knöschke prezentis lumbildojn pri Ĉeĥoslovakio. Entute denove tre utilaj kaj agrablaj tagoj en Bad Saarow.

Kurso en Doneck

Jam ekde 3 jaroj en Tuturba regiona scienc-teknika biblioteko nome de N. K. Krupskaja ĉe la fako de fremdlingva literaturo funkcias Esperanto-kurso (ĉiam 3-monata por komencantoj). La fako nun havas vortarojn, lernolibrojn kaj periodaĵojn en Esperanto. Ekde la 7-a de februaro 1976 komenciĝis nova kurso. En ĝi lernas laboristoj, teknikistoj, oficistoj, instruisto el la lernejoj ktp. entute ĉirkaŭ 60 personoj. Gvidas la kurson reprezentanto de la E-sekcio en la urba interklubo Nikolaj Starodubcev.

La II-a seminario por junaj gvidantoj
12.- 15. 4. 1976

Ĉiam denove kaj ĉiam pli forte la esperantistoj de GDR en kunvenoj, kunsidoj kaj konferencoj substrekas la gravecon kaj neceson de laŭplana edukado de junaj Esperanto-gvidantoj. Tial ni okazigis en tiu ĉi jaro la II-an seminarion en tiu-ĉi senco. Ĉijare la seminarion partoprenis 30 gejunuloj el preskaŭ ĉiuj distriktoj de nia respubliko.

Krom du esceptoj la partoprenantaro estis malpli ol 25-aĝa!

Ĉefe la gejunuloj estis lernantoj, faklaboristoj aŭ studentoj. Inter ili estis novuloj de la E-movado kaj ankaŭ „malnovaj leporoj". La programo konsistis el diversaj prelegoj (ekz. pri „Esperanto en teorio kaj praktiko" de D. Blanke, „aktualaj aspektoj de la aktiveco de la GDR-esperantistoj en la Kulturligo" de R. Graetz kaj „problemoj de la aktiveco de GDR-esperantistoj en neesperantista medio kunlabore kun aliaj organizaĵoj" de R. Krips, diskutoj pri la problemoj kaj progresoj en la distriktoj, varbado por gejunuloj, Esperanto-aranĝoj en 1976 en GDR kaj internaciaj turismaj aranĝoj 1976.)

Unu kulmino de la seminario estis la vizito de reprezentanto de la Centra Konsilantaro de Libera Germana Junularo, André Waldeyer, kiu estas la vicĉefo de la sekcio por internaciaj rilatoj.

Vespere la partoprenantoj de la seminario fariĝis plej aktivaj kaj viglaj. (Sed tio ja estas bone konata, ke kun biero oni pli bone povas diskuti!) Niajn vesperojn ni komencis per lumbildprelegoj pri UEA-kongresoj (D. Blanke), la TEJO-kongreso en Fredericia (R. Krips) kaj pri Francio (I. Erfurth).

Krome neniu povis plendi pro malbona vetero. Oni eĉ povis sunbruniĝi ĉe la lago dum la tagmezpaŭzo. Entute la seminario estis tre utila por la estonta evoluo de la Esperanto-movado de la junularo en GDR kaj evidente ĉiuj partoprenantoj estis tre kontentaj. *R. Krips*

Esperanto-rusa vortaro — utila vortaro

Kiel komencanto mi tre multe uzadas por komprena legado la Esperanto-germanan vortaron de E. D. Krause. Bedaŭrinde mi devis konstati, ke tiu-ĉi cetere bona vortaro ne enhavas ĉiujn por la legado necesajn vortojn. Tial mi legis kun granda intereso la recenzon pri la Esperanto-rusa vortaro de E. A. Bokarev, aperintan en „der esperantist" n-roj 67/68, p. 36. Nun, ricevinte tiun-ĉi vortaron de CLR kaj laborante per ĝi, mi povas nur rekomendi al ĉiuj esperantistoj parolantaj ruse, akiri ĝin, ĉar en ĝi estas troveblaj multaj vortoj, kiuj ne staras en la Esperanto-germana vortaro. Ĝi estas bonega kompletigo al la vortaro de E. D. Krause kaj pravigas ĉiukaze la prezon de 4,65 m.

Siegfried Müller, Senftenberg

Eĉ tio okazis

Tro peza

La franca dikventrulo Jacques Meunier ne sukcesas ekscii sian precizan pezon. Staranta sur pesilo li ĉiam ricevas pesilkvitancon kun admono: „Ne grupe surpaŝi pesilon!“

Lasta rimedo

Inter la 232 ofertoj kiujn ricevis la aŭtomekanikisto John Withers el Hampton, usono, je svatiga anonco, ankaŭ troviĝis kvar ofertoj kun foto, en kiuj malesperantaj edzoj lin petis preni iliajn edzinojn.

36 tagoj inter serpentoj

Trevor Krüger el Sudafriko pasigis 36 tagnoktojn en ejo komuna kun serpentoj, tiamaniere superante la tiaspecan mondrekordon je 5 horoj. Li estis lerninta sidi kaj dormi senmove. En la lastaj horoj de sia restado Krüger tamen malsingarde kaŭzis vivdanĝeran momenton. Matenmanĝante li faligis sal-disŝutilon, kiu rulis trans la planko. Tio sufiĉis por kolerigi unu el la 48 venenaj bestoj. Bonŝance ĝi retrankviliĝis, kiam Krüger ĵetis al ĝi pecon da lardo.

Aĉvetera asekuro

La usona firmao „Good Weather Incorp.“ (Bonvetera societo) asekuras turistojn kaj feriantojn kontraŭ malbona vetero. La „asekura tempo“ de la tago estas precize indikata: de la 10-a matene ĝis la 4-a posttagmeze. La kotizo estas 1 dolaro tage. Se pluvas, la asekurito ricevas 40 dolarojn tage. Eĉ en „malbona“ jaro la firmao kalkulas netan profiton de 500 000 dolaroj.

Natur-koktelo

Afiŝo ĉe koktelejo de ripoz-gastejo en Meksiko, kie kelkfoje senteblis tertremoj: „Atenton! Tertrema regiono! Ĉi-tie vi ricevas koktelojn miksitajn de la naturo.“

Fervoro

Per radio-ondoj la polico de Oakwood (Alabamo) ordonis: „Atenton! Atenton!“ Policpatrola veturilo PX 2 tuj al 3-a avenuo, kruciĝo 3-a strato! Tie promenas tutnuda virino!“ Kelkajn minutojn poste ĉiuj deĵorantaj policveturiloj aperis je la indikata strat-kruciĝo.

Strikta obeo de la domordo

En la ĉambroj de pensiono en Luzern (Svisio) sub la sonorilbutono pendas noto: „Ĉambristino — trifoje mallonge premi!
Servistino — unufoje longe premi!“
Iu gasto estis aldoninta: „Kun plezuro . . . !“

Admono

Dankleteron de la fervoja administrejo ricevis la 26-jara brito Ron Miles, kiu per bicikla lampo haltigis trajnon nordokcidente de Londono, kiam li estis eltrovinta ke huliganoj baris la relojn. La dankletero finis kun la postulo, estonte ne plu senrajtigite surpaŝi fervojan terenon.

Trad. Linde Knöschke

II-a Kongreso de ČEA

La II-a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio depost ĝia fondiĝo (1969) okazis de 7a—8a de februaro 1976 en Praha. Ĝin partoprenis preskaŭ 200 delegitoj kaj gastoj, inter ili delegitaroj de Bulgara Esperanto-Asocio, Pola Esperanto-Asocio, Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko kaj de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR. La kongreso multe laboris, elektis novan estraron de ĈEA, akceptis novan statuton kaj agadplanon ĝis 1980. Reelektiĝis kiel prezidanto Josef Vitek kaj kiel ĝenerala sekretario Zdenko Křimsky, al ambaŭ niaj kolegoj kaj amikoj tre varmajn gratulojn. Necesas emfazi, ke la delegitaro de GDR (R. Graetz kaj D. Blanke) uzis la eblecon kunesti kun la alilandaj delegitaroj, interkonsultiĝi pri aktualaj problemoj de la Esperanto-movado. Ankaŭ estis speciale daŭrigita la pensinterŝanĝo pri la plua evoluigo de la kunlaboro inter ĈEA kaj la esperantistaro en Kulturligo de GDR.

Preleg-vojaĝo de Jerzy Grum

La konata pola ĵurnalisto, redaktoro en la Esperanto-redakcio de Radio Varsovio, tradukisto kaj eminenta stilisto, Jerzy Grum, prelegvojaĝis de 31. 1. 1976 ĝis 6. 2. 1976 tra GDR. Lia vojaĝo estis entreprenita realite al la jarprotokolo pri kunlaboro inter PEA kaj CLR por 1976.

Jerzy Grum prelegis en Berlin, en la kadro de la 10a Seminario por Esperantistaj Kursgvidantoj en Bad Saarow, en Leipzig, Karl-Marx-Stadt kaj Dresden. En interesa prelego li informis la esperantistan aŭskultantaron pri aktualaj problemoj de la kulturpolitiko de Pollando post la VIIa Partia Kongreso de PULP (Pola Unuiĝinta Laborista Partio). Kompreneble s-ro Grum vaste informis pri la senprecedenca agado de la Esperanto-redakcio de Pola Radio kaj pri la pola Esperanto-movado ĝenerale. Entute plua paŝo por pliproksimigi la du najbarajn popolojn ankaŭ pere de la internacia lingvo.

Jozefo Petrin 1905—1975

Forasis la 30. novembro 1975 la prezidanto de la Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato, Jozefo Petrin.

Kunsido de Centra Laborrondo

La unua ĉijare laŭvica plenkunsido de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR okazis la 28. kaj 29. februaro en Dresden. La vesperon antaŭe Distrikta Laborrondo Esperanto el Dresden aranĝis tre interesan spertinterŝanĝon pri aktualaj problemoj de la esperantista agado. La membroj de CLR i. a. diskutis la materialojn, diskutatajn de la popolo kaj decidotajn de la IXa partia kongreso de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio, traktis la direktivon pri elektoj de la esperantistaj estraroj sur subdistrikta, distrikta kaj respublika ebenoj, pridiskutis la staton de la junulara agado kaj aŭskultis diversajn raportojn kaj informojn.

De speciala graveco estis la fakto, ke partoprenis la kunsidon la ĝenerala sekretario de Pola Esperanto-Asocio, inĝeniero Boleslaw Staszczak, kiu informis pri la agado de la esperantistaro en Pollando.

Kun kontento la membroj de CLR akceptis raporton pri duflanka konferenco inter CLR kaj la ĉefa estraro de Ĉeha Esperanto-Asocio.

Ernst Wichert 90 jara

La 29. 6. 1976 la senlace aktiva esperantisto Ernst Wichert festis sian 90-an vivo-jubileon. Ernst Wichert dum la lastaj jaroj tre meritiĝis tradukante poezion de modernaj verkistoj de GDR, i. a. de Johannes R. Becher. Al la jubileulo ankoraŭ multajn jarojn en sano kaj feliĉo.

CLR

Jubileo 85-a

La 12. 2. 1976 la konata germana esperantisto Walter von Waldowski, vortaristo kaj sukcesa kursgvidanto, fariĝis 85-jara.

Centra Laborrondo kore gratulas al la orjubileulo dezirante ankoraŭ multajn agrablajn kaj sanajn vivojarojn.

Ni danke ricevis

— Aktoj de la Akademio, II, 1968—1974, Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, No 10. Rotterdam—Paris 1976, 80 p.

— F. R. Kreutzwald. Kalevipoeg, Estona Popola Eposo, Tallin 1975, 85 p. kun koloraj pentraĵoj.

Recenzoj sekvos.

KORESPONDDEZIROJ 31635

GDR

Kiu povas helpi? Mi serĉas div. n-rojn de „der esperantist“: 1—8, 18—25, 28—31, 34, 35, 43, 44. Gerhard Böttcher, **7031 Leipzig,** Maurice-Thorez-Straße 38

15 gekursanoj dez. kor. tutmonde, bv. skribi al: Gerhard Böttcher, **7031 Leipzig,** Maurice-Thorez-Straße 38

Dez. kor. pri ĉ. t.: Karl-Heinz Drechsel (22 j.), 9208 **Lichtenberg 77**

Junulo, 16-jara, dez. kor. tutmonde pri ĉ. t., kol. bk. pm.: Hannjo Grosch, 402 **Halle/Saale,** Robert-Koch-Straße 8d

Eugeniusz Jendrysiak, Rothensee, 3019 **Magdeburg,** August-Bebel-Damm, Flachbauten 3/15, dez. kor. k. germ. esp.

Junulino, 16-jara, komencantino, dez. kor.: Karin Margaŝefski, 9208 **Lichtenberg 124**

Peter Ritz, 608 **Schmalkalden,** Weidebrunner Gasse 13, (21 j.) dez. kor. tutmonde pri geografio, astronomio, vojaĝoj

Serĉas jenajn n-rojn de „der esperantist“: 1—8, 11, 12, 18—25, 26—31, 34, 35, 40, 41, 43, 52—56. Mi pagos aŭ interŝ. kontraŭ alia esp. literaturo: Oskar Stolberg, **705 Leipzig,** Erich-Ferl-Straße 78

Kolumbio

Dez. kor. prefere kun filatelistoj de GDR, Luis Fernando Martinez Solís, Kesto Aerpoŝta 6950, **Medellin - 1,** Kolumbio, Sud Ameriko

Kubo

Enrique L. Miranda, Avenida 7/—94/9, entre 94 y 98, Güinez, **Habana,** 49 j., teksa teknikisto, dez. kor. tutmonde pri ĉ. t., kol. bk. pm.

Rafael L. Miranda, prez. de „Güinez Esperanto-Rondo“, Apartado 53, Güinez, **Habana,** 42 j., kontisto dez. kor. tutmonde pri ĉ. t., kol. bk. bm.

Lucas Fernandez Camejo, Ave 47, n-ro 11203, Reparto Liberacion, San Jose de las Lajas, **Habana,** studento, dez. kor. tutmonde, kol. bk, pm, librojn, revuojn, gramofondiskojn ktp.

Soveta Unio

Lernantinoj, 15jaraj, dez. kor. kun ĉ. l. pri ĉ. t., kol. bk, pm, esperantaĵojn: Antonina Poljomkina, **453 200 Salavat,** str. Puŝkina 13—1, Baŝkirio; Larisa Akkulova, **453 200 Salavat,** str. Gagarina 20—42, Baŝkirio

Junulino, 16jara, dez. kor. tutmonde pri kino, sporto, popmuziko, turismo, aŭtomobilojn, kol. bk, aktorkartojn: Brigitta Rudjinska, Brivibas str. 96—1, **Liepája,** Latvio

Junulo, 17jara, dez. kor. tutmonde, kol. pm, bk: Laimius Straznickas, **234 365 Staklíškes,** Prienu raj. Litovio

Virve Pajula, Aruküla, Viru-jaa gupi Sjsk. Rakvere Raj., Estonio, (25j.) dez. kor., kol. pm, bk k. esp.-rev. + librojn

Jurgis Valiunas, Alytaus raj. 234 593 **Punia,** Litovio, dez. kor. tutmonde, kol. pm, bk k. diskojn

Librotenisto, 25jara, dez. kor., kol. pm, bk k. esp.-librojn, Arvo Toomsalu, **Pärnu,** Estonio, str. Suur-Jõe 54

Komencantinoj el Pärnu, Estonio, dez. kor. tutmonde, kol. bk: Kórgesaar, Silva, 12j., lernantino, str. Kitse 3 — Kórgesaar, Sirje, 14j., lernantino, str. Kitse 3 — Tann, Helve, 52j., kuracistino, str. V. Aru 4—6 — Välimaa, Floreida, 60j., denta teknikistino, str. Seedri 1a — Koor, Leida, 18j., lernantino, str. Luka 32a — Rinsar, Lia, 17j., lernantino, str. Suur-Jõe 16—11 — Karula, Ly, 17j., lernantino, str. Kingissepa, 38—2 — Taho, Zoja, 27j., ekonomistino, str. Haapsalu 37 — Rumen, Tiiu, 16j., lernantino, str. Haapsalu 33 — Tisler, Kreedi, 30j., med. flegistino, str. Rüsika 4 — Löhmussar, Elvi, 38j., flegistino, str. Suur-Kuke 67—24 — Linn, Helgi, 41j., apoteka asistentino, str. Luha 23

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto).
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60.
Fernruf: 2 20 29 91

Verantwortl. Redakteur: Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, **Werner Pfennig, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. - Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.**
Druck: Druckwerkstätte Glauchau

Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 522